

Eŭropa Bulteno

Majo 2013, Numero 127

GRAVA ATINGO DE LA EŬROPA BULTENO

Post preskaŭ trijara klopodado ni sukcesis en la Eŭropa Bulteno iom post iom aperigi 27 artikolojn pri Esperanto-movadoj en ĉiuj EU-landoj krom en Cipro, kie tiu movado ĝis nun ne ekzistis.

Ni planis post kiam tiu serio finiĝos aperigi libron kun ĉiuj 27 artikoloj kaj tiel disponigi al la movado kaj ties historio gravan libron kiu montras la staton en la unua jardeko de la 21-a jarcento, en la periodo ĉirklau la 125-a jaro de ekzisto de Esperanto. En tiu ĉi numero ni aperigas la lastan artikolon pri la portugala E-movado. Necesos kelkmonata laboro por kunmeti la tuton, kompletigi, plibonigi kaj supozeble en aŭtuno povos aperi elektronika versio de la libro kaj poste, depende de la intereso de la EU-aj esperantistoj, ni aperigos ankaŭ la paperan version.

Zlatko Tišljar, la redaktoro

PORTUGALA ESPERANTO-MOVADO



Resuma historio



preskaŭ ĉiuj viroj, mezjunaj, proporcie multaj komercistoj, framasonoj, respublikistoj (Portugaliao estis monarĥio ĝis 1910), kaj anoj de reformaciaj eklezioj (kvankam katolikismo estas la plej ofta konfesio en la lando).

Jam en tiu ĉi unua fazo aniĝas al la movado kelkaj homoj, tiam ankoraŭ tre junaj, kies rolo daŭros jardekojn. Inter ili aparte nomindas Bernardino Martins d'Almeida ("Luzo Bemaldo") kaj Jorge Saldanha Carreira. Tiam ĉi, la esperantistaro agas insiste ĉe la gazetaro kaj multas la baznivelaj kursoj; jam esperanto estis dudekjara kaj oni plu propagandis pri tiu ĉi «nova lingvo».

La organiza strukturo de la movado ĉiepoke estas disa, kun pluraj apartaj grupoj, kiuj tamen kutime bone kunlaboras. Krom unuopuloj en multaj "provincaj" lokoj, estas firma kluba agado en Lisbono kaj Oporto, kun prelegoj, kursoj, kaj promenoj. Publikiĝadis diversaj revuoj/bultenoj, multaj propagandiloj, kaj kelkaj libroj — plejparte lerniloj, vortaroj, kaj frazlibroj.

En 1926 ekregis en Portugaliao konservativa diktatoreca reĝimo kiu daŭris ĝis 1974. Ties rilato al la movado alternis inter suspektema tolero kaj praktika subpremo, kaj ĝi draste kondiĉigis la landan esperanto-agadon dum ties tuta daŭro — kio lasis pluajn markojn.

Dum la jardeko de 1920, ekas dua fazo de la movadhistorio en Portugaliao: Aperas, kiel en aliaj landoj, laborista movado — notindas i.a. loka agado en la industria urbeto Barejro (*Barreiro*, apud Lisbono). La aparteco inter laborista kaj "neŭtrala" movadoj ne estis tiom drasta kiom aliie, kaj dependis multe pli de la dividoj socitavolaj kaj politikaj de la portugalia socio ol de enmovadaj tendencoj. Tial troveblas multaj kazoj de longa kaj sukcesa kunlaboro inter tiuj du "flankoj".

Ankaŭ tial diversaj esperantistoj kaj grupoj spertis tre malsame la "atenton" al la movado flanke de la politika polico: Dum iuj estis viktimoj de konfiskoj, arestoj, kaj minacoj, aliaj povas atesti ke nenian ĝenon ilia persona esperanto-agado suferis: Tiu variado laŭis nemovadajn aspektojn de la koncernato, nome ties socian tavolon kaj individuan "suspektindecon".

Pro tiu persekutado iuj esperantistoj ekloĝis eksterlande (i.m.a. Manuel de Seabra, Roberto das Neves, kaj Joaquim Calado) kaj enlande la movada laboro perdis la ĝistiaman viglon — ĉu pro rekta subpremo, ĉu pro timo. Eĉ post kiam mildiĝis tiu subpremado (flanke de la Polic-

En 1892 publikiĝis la unua esperanto-lernolibro en Portugaliao (de Heinlein Ferreira). Kiel en aliaj eŭropaj landoj baldaŭ la nova lingvo ekhavis "adeptojn" — la unua portugala esperantisto estis verŝajne Costa e ALMEIDA, kiu fariĝis poste ano de la Lingva Komitato, sed ne certas kiom el tiuj pioniroj estis jam fakte parol- aŭ eĉ kompren-kapablaj. La unuaj portugaliaj esperantistoj venis ĉefe elinter "progresemaĵ" rondoj: Ili estis plejparte intelektuloj kaj etburĝoj,

kaj Milit-ministerioj), post la Hispania Civila Milito kaj la Dua Mondmilito, daŭre estis rifuzata permeso reklami kaj okazigi esperanto-kursojn kaj (re)starigi klubojn, plurfoje petita (ĉe la Edukministerio).

Tial, dum la tuta meza duono de la 20-a jarcento, la portugalia esperanto-movado agadis laŭdevige en neformalaj organizoj, kiuj ne havis fiksjajn postenojn kaj ofte eĉ ne nomon. Esperantistoj renkontiĝis en kafejoj, organizis libro-servojn kaj cirkulantajn bibliotekojn, kaj praktikis leteramikecojn kun alilandanoj (i.m.a. menciindas tiu de Werther Sacramento kun J. Régulo Pérez). La plej malnovaj portugaliaj esperantistoj vivantaj nuntempe eklernis en tiu ĉi epoko.

Malgraŭ tiaj malfacilaĵoj organizi kaj organiziĝi, diversaj elstaraj agadoj estis entreprenitaj de la portugala esperantistaro en tiuj jardekoj. Menciindas ekz. la helpo, per alsendo de dosaj manĝaĵoj kaj pasportaj faciligoj, al esperantistoj persekutitaj de la nazia reĝimo, i.a. al Lidia Zamenhof, ebligita de la portugalia neŭtraleco; tiu ĉi agado motivigis UEA-honormembrecon al Manuel de Freitas.

Alia tia malgraŭa agado estis publikigo de kelkaj libroj kaj (efemeraj) gazetserioj. Notindas interalie la aperigo de 38 multtemaj popolklerigaj libretoj inter 1941 kaj 1948, verkitaj portugallingve de la poste famiĝinta filozofo Agostinho da Silva, tradukitaj de kvaropo da esperantistoj kaj eldonita de Portugala Eldona Rondo, en Oporto, kiu pretigis ankaŭ aliajn librojn ĝis kiam la sekreta polico konfiskis ties havaĵojn. Alia notinda eldonagado okazis en 1959, pro la zamenhofs centjariĝo, per publikigo de *Antologio de Portugalaj Rakontoj*, kun 14 poaŭtoraj etprozaĵoj, tiam tute modernaj, tradukitaj de ok lisbonaj esperantistoj.

La situacio de “duonmalpermeso” daŭris ĝis 1972 kiam finfine povis fondiĝi tutlanda asocio, kiu aniĝis al U.E.A. en 1979. La ĝistiam mallibero estis forminta landan movadon kun specifaj trajtoj — kie paradokse abundis veteranoj tamen malspertaj, kie mankis lokaj kluboj, kie oni devis agadi ene de socio kies publika koncepto pri Esperanto estis ke ĝi estas io malnova kaj politike inspirita...

Nuna stato



Kvardek jarojn poste, Portugalio restas kiel lando tria-vica en la movada spaliro, mankanta je kvanto en preskaŭ ĉiuj indikiloj, komparebla nur kun relative malpli grandaj landoj, kiuj estas konataj en la movado nure pro la unuopa agado de malmultaj homoj — kiel Malto, Islando, aŭ Sudafriko.

Eĉ tiel, menciendas du internaciaj fakaranĝoj (ILEI-konferenco en Sintro, 1983, kaj IKEK-konferenco en Lisbono, 1996), kaj internacia agnosko de kelkaj literaturaj agadoj — nome tiuj de etprozisto Eduardo Novembro, redaktestro kaj eldonisto João José Santos (*La Karavelo*), kaj, pleje, Gonçalo Neves — poeto kaj prozisto, poste eseisto kaj esperantologo, aktivinta ankaŭ en aliaj planlingvaj movadoj. Aliaj aktivuloj atingis videblecon internacie en fakaj rondoj — i.a. Faria de Bastos, Luís Ladeira, kaj Alcino Alves. Tiuj unuopaj agadoj, kompreneble, okazas je plena aŭtonomeco, kun nure laŭpeta apogo de la asocio.

Menciindas ankaŭ ke iuj portugalaj esperantistoj aktivas eksterlande pli-malpli elstare (en Angolo, Belgio, Danio, Hispanio, Irlando, Nederlando, Rusio, Usono...), multaj lerninte la lingvon en Portugalio — tio plu okazas eĉ longe post la malpermeso. Simetrie, proporcie multaj eksterlandanoj loĝantaj en Portugalio membras/membris en la asocio (notindas i.a. Wilhem Th. Oeste kaj Hassan M. Al-Amili), asocio kiu, dum ĉ. duono de sia ekzistado, ĉiam ĝis nun havis almenaŭ unu eksterlandan postenulon.



Portugala Esperanto-Asocio havas nuntempe (2013) malpli ol 200 anojn, post ĉ. 400-opa pinto en la 1980-aj. Eĉ se malsamaj konceptoj pri membreco kaj membrigo tamen ne ebligas rektan komparon (kaj des malpli kun nombroj pri antaŭaj epokoj, ankaŭ pro manko de fidindaj nombradrezultoj), estas certe ne eraro aserti ke la portugalia esperantistaro proporcie malmultas, inter ĉ. 10 milionoj da homoj en la lando. Gastoj el eksterlando, kiuj vizitas longe aŭ ofte, kutime laŭdas ke tiun kvantmankon tamen

kompensas averaĝa kvalito inter la portugalaj movadanoj, almenaŭ je lingva nivelo, kaj ĝojas ke (kompare) malabundas eternaj komencantoj, “stranguloj”, kaj kvereloj. Ĉi lastaj mankas ankaŭ kompare al la unua jardeko de post la fondiĝo de la asocio, dum kiam kelkaj esperantistoj, pli malpli verve, malemis asocianiĝi — memagnoske pro politikaj motivoj sed flanke de homoj el ĉiaj politikaj sektoroj...

Iom ĉie tra la mondo, la populariĝo de komputiloj kaj retuzado meze de la 1990-aj revivigis la pionirepokan fenomenon de amasa memlernado, ebligita ankaŭ de senpera informiĝo, kaj ekebligis same senperan internacian kontaktadon kaj eĉ movadan aktiviĝon — ĉion ĉi tute preter lokaj kaj landaj strukturoj. Ankaŭ en Portugalio tio okazis/okazas: Dum la lastaj dekkvin jaroj plej multaj novaj esperantistoj estas memlernintoj, kontraste kun la antaŭaj jardekoj kiam tiuj estis pleje kursanoj. La fakto ke Portugala Esperanto-Asocio ekhavis retĉeeston relative frue (retpoŝton en 1990, paĝaron en 1996, forumon/dissendilon en 2001) ebligis konatiĝon kun tiuj novaj esperantistoj. El tiuj, multaj ne (tuj) membriĝis, pro la dume ŝanĝiĝinta socia koncepto (en- kaj ekster-movada) pri asocioj, sed preskaŭ ĉiuj kunlaboremas.

Ĵusa kalkulo pri la portugalia esperantistaro (2012) listigas ĉ. 150 konatajn fluparolantojn (el kiuj ĉ. duono estas asocioj) kaj ĉ. 350 konatajn komencantojn diverstipajn (el kiuj ĉ.

sesdeko estas asocioj), kaj supozas la totalon ĉ. milo. Regulan kontakton kun interesiĝantoj kaj informpetintoj (entute ĉ. 1200 aktivaj nomoj en 2012) la asocio flegas kaj ilin gvidas laŭpete en lernado (mema aŭ instrua) kaj/aŭ en disverstipa informiĝo pri la lingvo kaj movado.

Tiaj estas ankaŭ la rilatoj de Portugala Esperanto-Asocio kun la universitataj medioj, kiu en 2012 alportis la unuan el pluraj baldaŭaj rezultoj — magistriĝa diserto kun 19/20-ona aprobo (Sónia Apolinário, ISCTE - Dep. Sociologio), teme pri la landa movadhistorio.

Tiaj estas ankaŭ la rilatoj de la asocio kun la amasinformiloj: Ne tiom propagando aŭ reklamado, sed informado. (En 2003, okaze de la tiujara kampanjo sponsorita de Etsuo Miyosi, Portugala Esperanto-Asocio publikigis en grava ĵurnalo duonpaĝan reklamon kiu kaŭzis neniom da videblaj sekvoj; unu jaron antaŭe dupaĝa raporto/intervjuo en simila tutlanda gazeto, kiu publikigis ja senpage, rezultigis milojn da ekstraj retejvizitoj kaj dekojn da telefonaj informpetoj...)

Atento al Esperanto flanke de la tradiciaj amasinformiloj — gazetaro, radistacioj, kaj televidkanaloj — estas tamen malofta, eĉ se ĝenerale pozitiva: Dum la lastaj 10 jaroj konatas nure 88 (kp. 67 en la antaŭa jardeko) ajntipaj aperoj de Esperanto en la portugalia gazetaro. Dirindas tamen ke mankadis inter 1994 kaj 2013 en la strukturo de Portugala Esperanto-Asocio aparta postenulo por kontaktoj kun la amasinformiloj.

La menciita retpaĝaro, vizitebla en la propra retnomo esperanto.pt, estas kulise refasonata kaj tial prezentas dume ties staton de 2007 senŝanĝe, malkrom unu aktualigata startpaĝo. Krome, Portugala Esperanto-Asocio eldonas esperantlingvan bultenon (*Nia Bulteno*) kiu, kompanse al diversaj internaciaj laŭdoj pri redaktkvalito, havas tre malregulan kaj averaĝe maloftan aperitmon.



Lisbono, 2016 aŭ 2017.

António Martins-Tuválkin

Portugala Esperanto-Asocio disponas ekde 1972 pri bona sidejo en Lisbono, kie funkcias oficejo, vendejo, biblioteko, kaj renkontiĝejo. Lukontrakta leĝŝanĝo en 2013 riskigas tamen ĝian forperdon. En urbeto Penacova en centra Portugalio funkcias ekde 1986 kooperativa feriejo mastrumata de organizo fondita de esperantisto Eusébio dos SANTOS, kie foje okazas movadaj aranĝoj kaj neformalaj/privataj renkontiĝoj de esperantistoj.

Krone de 40 jarojn longa insistado flanke de UEA, la estraro de Portugala Esperanto-Asocio finfine en 2013 konsideras la eblecon kunlabori pri okazigo de Universala Kongreso ie en la lando, verŝajne en

KIE NI (ESPERANTISTOJ) ERARIS?



La bona demando de Andreas Kuenzli: „Kion esperantistoj faris mise en sia historio“ igis min pensi. Kiom ni mem kulpas pri la nekontentiga sukceso de Esperanto? Kion ni faras kaj faris malĝuste?

Mi scias ke min ĉiam ĝenis la troa sektismo, ofte fanatismo de esperantistoj kaj enfermiĝemo (ekstrema formo de tio estas la Civito, kiu ja proklamas kompletan memsufiĉon). Tamen mi ankaŭ komprenis ke sen tiuj esperantistaj „sektaj ekstremistoj“ la Movado kaj do ankaŭ la lingvo ne travivus krizojn kiaj la du mondmilitoj kaj diktatoraj reĝimoj, ĉu dekstraj ĉu maldekstraj. Sekve

ankaŭ tio havis el longdaŭra perspektivo gravan rolon por la supervivo.

Zamenhof laŭ mi ne tiom gravas pro bonaj lingvaj solvoj kiujn li trovis kreante bazon de Esperanto, ĉar se ne li, baldaŭ poste ion similan kreus iu alia. Certe postaj lingvoj kiel Ido, Interlingua kaj aliaj pli malpli uzis la ideojn de Zamenhof kaj kreis esence ne multe pli malbonajn lingvojn, kelkasence eĉ teknike pli bonajn. La genienco de Zamenhof estis en la fakto ke li vivigis Esperanton diference de aliaj postaj aŭtoriniciatitaj lingvoj kiuj neniam ekvivis. Kiel? Per la intuicio ke lingvo ne estas plena lingvo sen socio. Efektive ne vivas lingvoj. Vivas socioj kiuj uzas lingvojn kaj pro siaj bezonoj ilin evoluigas. Do lingvo povas esti viva, se ĝi havas socion kiu ĝin uzas kaj kiu estas centra signo de la identeco de tiu socio kunkreanta la kulturon de tiu socio. Kaj la socio ne povas ekzisti sen ideologio kiu kuntenas la homojn per aro da ideoj pro kiuj la homoj kredas esti esceptaj kaj gravaj. Tiuj ideoj povas doni al la homoj sencon por ilia vivo. Kaj Zamenhof difinis tiun ideologion en siaj poemoj en kiuj li ĉefe asertis ke homoj kiuj okupiĝas pri Esperanto kontribuas al plibonigo de la mondo, al ĝia paco. Ĉu ne fortega ideo kredi sin kontribuanto al tia grandioza celo?

Kaj tiu ideologio kreis tion kion oni nomas Movado kaj mi nomas novpopolo. Grupo kiu kredas pri la idealoj difinitaj de Zamenhof kaj agas por la Movado (popolo) kaj kontribuas al ties materia kaj spirita kulturo. Ne necesas ke tiuj homoj regu bone Esperanton, eĉ ofte okazas ke la plej vervaj esperantistaj sektanoj estas homoj kiuj scias vere diri nur „bonan tagon“ kaj tute ne kapablas paroli en la lingvo. Sed ili fanatike batalas por Esperanto vidante en ĝi esencon de la ideologio al kiu ili plenkore kredas.



Dank al tiu ideologio kreiĝis la popolo (socio kiu identiĝis per la ideologio kaj estas signata per sia lingvo) kiu poste vivis same kiel ĉiuj aliaj diasporaj popoloj aŭ grupoj (judoj, romaoj, kurdoj...) kiuj ne havas sian ŝtaton. Kaj tiu grupo pluekzistis malgraŭ ofte tute malkonvenaj cirkonstancoj en lokoj kie ili vivis (ŝovinismaj kaj diktatoraj reĝimoj kiuj malpermesis la pacistojn). La ideologio de Zamenhof montriĝis ege forta kies radikoj apenaŭ estas elŝireblaj malgraŭ la fakto ke la novaj tempoj ĉiam pli pravas ke komuna lingvo ne malhelpas militojn.

La Movado ekzistas 125 jarojn, kio montras ĝian vivkapablon, sed ĝi ĉiam efektive konsistis el kelkdek milo da fidelaj adeptoj, kiujn oni povas konsideri veraj membroj de la Komunumo. Neniam pli kaj neniam malpli. Stranga fakto. Tio validas ankaŭ por la nuna tempo. Mi kredas ke tiu nombro estas difinita per celo regi grupon kiu ne havas materiajn rimedojn. Sen mono ne eblas pli. Nome, ĉiujare komencas lerni E-on almenaŭ 100 mil novaj homoj, sed la Movado en sia strukturo ne povas akcepti tiom da novuloj. Ĝi malebligas al ili atingi la maturiĝon (ili naskiĝas kaj mortas antaŭ ol esperantistiĝi). Simile kiel insulanoj de malgrandaj insuloj pro la resursoj de la insulo atentis ke la loĝantaro ne kresku pli ol tiu insulo toleras. La movado same grandas kaj Esperanto plu ekzistas kiel lingvo de eta homgrupo, tamen sufiĉe granda ke ĝi plu evoluas lingve kaj vive. Kial ĝi neniel proksimiĝas al sia baza celo: iĝi tutmonda helpilingvo?

Laŭ mi estas du esencaj kaŭzoj: a) kontraŭesperantaj fortoj estas ŝtatoj kaj potencoj kiuj defendas poziciojn de grandaj lingvoj kiuj okupis pli aŭ malpli da internacilingva pozicio, pozicioj de lingua-francaoj kaj b) la kontraŭstaro de la esperantistaro mem.

La 20-a jarcento estas karakterizita de naciaj ŝtatoj kaj batalado por superrego de grandaj nacioj. Rusoj akiris komence de la jarcento trionon de la mondo kaj influis al tiu teritorio politike, ekonomie kulture kaj lingve. La hispana dominas en granda parto de Ameriko, la franca en frankofonaj landoj, la araba en arabaj landoj, iom da kuko havas la portugala kaj la ĉina kaj fine la angla kiu post la dua mondmilito ŝajne nevenkeble konkeradas la tutan mondon. Tamen, ekzistas pluraj regionaj lingvoj kiel la indonezia, suahilia, germana... kiuj lingve influas kelkajn landojn ĉirkaŭ la baza ĉeflando. Tiuj daŭre batalas por sia superrego. Malgraŭ tio ke la angla konstante forpelas aliajn el siaj teritorioj, tamen tio ne estas tiel sukcesa kiel ŝajnas. En tiu procedo en kiu interfrapiĝas grandaj potencoj kun multega mono kaj armeoj, Esperanto kun popolo sen armeo, ŝtato kaj mono ne havis ŝancon, tial gravis ke ĝi simple supervivu kaj evoluu por esti pli evoluinta kaj preta en la tago kiam la cirkonstancoj ŝanĝiĝos. Kiam estos tiu momento? Oni povas starigi du hipotezojn:

1. Bonegan ŝancon por E prezentas la novteknologia mondo, la tutmonda reto. Ĝin ne facile povas regi naciaj fortoj
2. Bonegajn ŝancojn donas la kreskado de nova multŝtata lando EU kiu ne solvis sian lingvan demandon.

La unuan hipotezon jam iom post iom forigas la realo ke ankaŭ en la reto lingve interbatalas la naciaj potenculoj kaj ke Esperanto estas uzata nur de la apartenantoj de la propra popolo, kaj esence ĉi tie la ŝancojn ni ne povas eluzi por pli rapida ekspansio (kvankam en pli granda kvanto ol multaj pli nombraj popoloj kaj tial ĝi akiras pozicon pli grandan ol ĝi mem valoras. Evidente esperantistoj multe pli da tekstoj kreas ol bangladeŝanoj kaj tial guglo ĝin rimarkis kaj enmetis en sian tradukilon inter 64 plej gravaj mondaj lingvoj).



Aliflanke en EU ankoraŭ forte vivas la nacia ideologio kaj ene de ĝi plu batalas la grandaj potencoj: ĉefe la angla kun la franca kaj germana. En tiu batalo ili ne rimarkas la nanon kiu eventuale povus helpi ilin kaj forigi la neceson pri bataloj. Sed en tiu ĉi kazo jam enmiksiĝas la faktoro interna. Efektive la granda plimulto de esperantistoj efektive ne deziras ke Esperanto iĝu eŭropa lingvo pretestante tion per aserto ke per tio ĝi perdos sian tutmondan rolon. Sed la vera kaŭzo estas

ke en la ekzistanta E-a kulturo ili bone fartas, havas siajn poziciojn en la movado kaj ĝuas la staton kiun la movado donis al ili. En tiu popolo la politik-organiza sistemo konvenas al mezkapabluloj (mediokritatuloj) kiuj neniel volas perdi siajn sociajn poziciojn (esti prezidanto de loka klubo au iu asocio, eĉ se ĝi havas nur tri membrojn).

Do, la dialektika kontraŭdireco esprimiĝas en la fenomeno ke unuflanke la Esperantistan popolon kuntenas ideologio pri finvenkismo (nia granda laboro iam fine estos rekontita en la tuta mondo) kiu nutras la kredon de la Movadano ke li estas ege grava persono kun aparta ĉimonda destino kaj tio donas al li vivosencon pro kiu li racie celas kaj esperegas pri tiu fina venko kaj aliflanke troviĝas kontraŭa subkonscia, iracia dezirego ke la stato en kiu ni estas, la neatingita fina celo, restu kaj ne ŝanĝiĝu. Ni evoluigis praktikan vivon de nia popolo en kiu ni bone fartas kaj ni kiel ĉiu popolo tendencas al ne-malapero. Se la fina venko estus atingita, ĉiuj parolus Esperanton kaj nia eta mondo de idealismo en kiu ni havas multajn amikojn, multajn etajn ĝuojn kaj niajn sociajn poziciojn, malaperus. Do racie ni nutras nin per la esperata celo pri finvenkismo kaj agas por atingi tiun celon, sed iracie ni kontraŭstaras ĉiam kiam ni havas la impreson ke tiu celo tro rapide proksimiĝas.

Kie ni eraris? Mi kredas ke nenie. Eta movado ne havas ŝancon en batalo inter grandpotencoj, la nura saĝa celo estas klopodi supervivi – kaj tiucele helpis la sekteco kaj enfermiteco kaŭzita de ekstrema kredo al zamenhofa ideologio. Ne eblas scii kiam la stato de la rego de grandaj naciaj lingvoj malfortiĝos – do ni ne havas kaŭzon por ion ŝanĝi. (Imagu, se ni malakceptus la zamenhofan dogmon, la Esperanton-parolantoj ne plu kredus ke lingvo povas forigi militojn kaj perdus ideologion laŭ kiu NI ESTAS ELEKTITA POPOLO KIU ŜANĜOS LA MONDON, ĉu la movado longe plu ekzistus?). Tial plu kredigu al niaj adeptoj ke E-movado estas gravega por la estonta mondo kaj uzu la zamenhofideologion inter anoj de la eta popolo, atendante la ĝustan momenton. Tiun taktikon klare aplikis kaj difinis Ivo Lapenna.




Sed nuntempe io grave ŝanĝiĝas. Klasika formo de sociaj organizaĵoj havi membrojn kiuj pagas kotizojn ĉie disfalas. La reto donas rapidege kaj ofte senpage servojn kiujn ĝis nun donis la sociaj organizaĵoj. Homoj ne bezonas la orzanzaĵojn. La rezulto estas ke movadoj havas ĉiam malpli da organizitaj membroj kiuj pagas kotizojn kaj sekvas la regstrukturojn (obeas al loka klubestraro, subiĝas al la hierarkio de la koncerna movado kaj rilatas al organizaj kongresoj, manifestaĵoj kaj gazetaro). Anstataŭe evoluas en la reto paralelaj servoj kaj vivo neligita al la oficialaj establaĵoj. Estas subite nesciate kiom da novaj esperantistoj ekzistas, ĉar tiuj venas al neniaj kongresoj, abonas neniajn gazetojn kaj pagas neniajn kotizojn. Tio ne estas fenomeno nur de Esperanto-popolo, sed ĉie. Sed rilate la esperantistan mondon oni povas diri: la popolo kiu uzas E-on plu evoluas kaj kreskas kaj neniu plu kapablas kontroli tiun kreskon. Tiu popolo kreas novan formon de kulturo: antaŭ ĉio la filman, muzikan, novmedian kulturon kaj kulturon de bloga verkado. Ĝi ankaŭ kreas retajn servojn, utilajn programojn. Samtempe malfortiĝas la klasikaj formoj kiel la proza au poezia verkado, libroserva agado, teatra agado.

Ĉu ni ie eraris? Eble, sed mi ne vidas kie. Idisma, interlinguajisma kaj aliaj movadoj esence malaperis, ni plu ekzistas. Tio per si mem estas sukcesego. Mi opinias ke ĝuste tiu ne plu kontrolebla popola kresko en la sfero de nova kulturo kaj entreprenemo estas novaj vojoj per kiuj ni esploras kaj serĉas nian novan pozicion en la mondo.

Ĉu Esperanto sukcesos iĝi eŭropa lingvo au ĝi rapide konkeros la retan mondon aŭ ĝi nur plu ekzistos kiel eta movadeto, mi ne scias, sed al mi ŝajnas ke estas malfermitaj ĉiuj tiuj perspektivoj.

Ĉu oni povas akuzi iun ajn popolon pro tio ke ĝi ne sukcesis kreski? Laŭ mi ne. Tiuj kiuj ne havis grandajn imperiajn apetitojn restis malgrandaj, sed gravas ke ili plu ekzistas. Tiuj kiuj imperiisme konkeradis nun malkreskas naskokvante. Ankaŭ por ili gravas plu ekzisti eĉ se tio signifas ke la mankantan loĝantaron anstataŭigas nedenskaj apartenantoj al la baza kulturo. Gravas plu ekzisti.

Alia fakto, kiu ĉiam ĝenis min, estis tabuo en la E-movado okupiĝi pri profitaj mongajnaj agadoj. Pro tio ke Zamenhof iam anatemis tiujn kiuj volas komerci per Esperanto, la Movado daŭre vivas kun la dogmo ke ĝi ne rajtas rilati al la materia vivosfero, ĝi estu ĉiam nur idealisma (spirita) aktivado. Sed eĉ la plej spiritaj homokupiĝoj kiaj la religioj ne povas longe ekzisti se ili ne klopodas bone vendi sian spiritan varon. Nur riĉaj eklezioj estas longdaŭraj.



Sed la E-movado strikte batalas konstante kontraŭ tiuj kiuj klopodas fari ion materiisman. Eĉ tiuj kiuj iom sukcesis estas plene ignorataj kaj ilia aktivado kutime mortas kiam tiuj aktivantoj mortas aŭ ĉesas labori. Mi mem sukcese gvidis entreprenon dum 20 jaroj kiu en sia lasta fazo de mia direktorado havis eĉ 10 enpostenigitajn en Zagrebo (Internacia Kultura Servo). La E-movado kroata klopodis tion kontraŭstari en la komenco, sed IKS ne cedis kaj daŭre prosperis dank al bona ekonomia politiko pro kiu ĝin financis ĉefe la kroataj neesperantistaj

fontoj. La Movado do ne povis poste kontraŭstari kaj havis ankaŭ multan utilon (IKS estis en tiu periodo la plej aktiva eldonejo de iama Jugoslavio de E-libroj, kreis la Zagreban Metodon de E-instruado kaj gvidis la tiam faman Pupteatran Internacian Festivalon), sed esence ĝi ignoris la agadon kaj neniel klopodis subteni similan agadon de iu alia. Kiam eksplodis milito tie, mi retiriĝis kaj baldaŭ IKS ĉesis agi por Esperanto kaj nenio simila refondiĝis.



La problemo kiun timis Zamenhof estas ke se oni komencas komerci per Esperanto kaj krei el ĝi varon, ke perdiĝos idealismaj celoj sub la premo de utilismaj. Sed tio per si mem estas malĝusta tezo. Oni povas idealisman spiritan celon multekoste vendi, ĉar ja homoj bezonas tiajn kredojn kia: ni pacigos kaj ŝanĝos la mondon. La religioj bonege evoluigis komercon pri tiu homa bezono kredi. Nuntempe montriĝas ke la foresto de materiaj rimedoj de la Movado estas la ĉefa bremsilo por nia prospero. Momente regas en la

reala mondo la ĉefideologio: Mono estas ĉio. Neniu plu volas okupiĝi nur pri idealismaj aferoj, se tiuj ne iel helpas gajni iom da mono. Ĉefe tio validas por la junaj kaj aparte gravas en la tempo kiam amaso da junaj tute ne povas trovi laboron. Tial ni havas grandegan krizon. Ĉu ni supervivos ĝin? Ŝajne ke la Movado konsciante la danĝeron, tamen ne volante ŝanĝi sian konduton komencas denove retiriĝadi en la propran ŝelon por ekdormi la vintran dormon

dum la monda pesta periodo kiun ni povas nomi MONA PERIODO. Aliflanke tamen en la Movado ekestas nova fenomeno: kreskas sufiĉe rapide diversaj Esperanton uzantaj entreprenoj kiuj trovis la manieron financi sin el la fondusoj de Eŭropa Unio. Ĉi-foje ne temas pri unuopaj solecaj klopodoj sed pri sufiĉe amasa fenomeno ene de kiu jam dekoj da homoj gajnas siajn salajrojn kaj tiuj entreprenoj investas sufiĉe da sia profito en la Movadan kulturon konsciante ke Esperanto estas grava por ilia ekzisto kaj ke ili mem devas kontribui al edukado de novaj lingvokapablaj personoj kiujn ili bezonas en sia laboro (ekz. E@I). Ĉu tiu fenomeno turnos la historion de monevita periodo de E-Movado montros la estonto. Mi esperas pri tio, ĉar tio estas la nura lumanta punkto en la nuna krizego.

Zlatko Tišljár

LA PREZIDANTO DE EEU MALLONGE INTERPAROLIS KUN MEMBRO DE EŬROPA KOMISIONO ŜEFKOVIČ



Sabaton la 4-an de majo mi mallonge renkontis slovakan membron de Eŭropa Komisiono Maroš Šefkovič. Oni petis min paroli dum 30 minutoj irlandlingve (kun interpretado, kompreneble!) pri "Irlando kaj Irlandanoj" en Berlaymont pro la tago de Eŭropo kaj pro la irlanda prezidenteco de EU. Šefkovič parolis tuj post mi. Li gratulis min pro mia prezentado kaj mi menciis al li lian kolegon Jozef Reinart. Li diris ke Jozef estas "la plej forta subtenanto de Esperanto en Slovakio" kaj li iom miris kiam mi diris ke ni ĉiam parolas

Esperanton kune. Mi havis eblecon mallonge menciigi Springboard dum mia prezentado.


Seán Ó Riain

LA 72-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO EN ZARAGOZO

Estis merkrede en Zaragozo, la 1-an de majo, kien ni alvenis trajne por ĉeesti la 72-an HEK kaj ĉar ni sciis ke la urbo indas kalman viziton dum almenaŭ unu semajno mia edzino kaj mi estis la unuaj kongresanoj, kiuj ĝuis la belecojn de la aragona urbo. Kiam ekalvenis aliĝintoj en la hotelon Goya (Kongresejo), ni jam pretis informi ilin pri la plej interesaj lokoj kaj bongustaj manĝoj en diversaj restoracioj. Iom post iom la luksa kaj malplena salono pleniĝis de homoj alvenintaj el la tuta Hispanio kaj eksterlando, la plimulto estis konatuloj. Unu plian fojon ni kunsidis kiel granda ronda familio por babiladi kaj paroladi pri temoj rilataj ĉefe al Esperanto kaj al la familio. Ĉe la akceptejo ni ricevis bele desegnititan sakon kiu enhavis dokumentaron pri la kongreso: belegan kongreslibron kaj la faman verkon Don Kihoto de la Manĉo, kiu estis speciala donaco al ĉiuj kongresanoj.



La temo de la kongreso estis "Lingvo kaj sento" kaj kun granda sento por esperanta lingvo disvolviĝis la evento. Lorenzo Noguero, sekretario de la LKK, prezentis la "Nesolenan malfermon de la kongreso" ĉar okazas ke ne ĉiuj homoj havas la eblecon alveni akurate la unuan tagon kaj nesolene kaj petoleme, li disdonis tipajn zaragozajn bombonojn al ĉiuj. Tuj poste la veterana esperantisto Antonio Marco Botella prelegis pri la tradukita verko *Don Kihoto* kaj ĝia tradukinto Fernando de Diego. Kiel kutime li prelegis malrapide kaj saĝe. Tagmeze okazis la interkona mateno kaj ni ĉiuj ĝuis brakumante la konatulojn kaj salutante la ceterajn kun granda kaj sincera emocio.



La ununura, sed grandioza ekskurso estis la vizito al la Alĥaferio, kie ni ĝuis en tre bona etoso la belecojn de ĉi unika araba kastelo en Zaragozo, gvidata de lerta homo, kiu iamaniere portis niajn spiritojn al tiu pasinta epoko. Dum unu horo ni sentis la arton kaj la belecon kreitan de arabaj kaj kristanaj artistoj. Reveninte en la kongresejon, ankoraŭ kun la menso ĉe la historio, Eduardo Berdor, prezidanto de LKK faris muzikan prelegon pri la valsoj de

Ŝopeno (Chopin) kaj pianludis kelkajn pecojn kun granda sukceso.

SoloTronik, la mondkonata muzikisto el Malago, koncertis ĉe la "Sala el Zorro", kie multaj kongresanoj kaj neesperantistaj interesiĝantoj ĝuis lian specialan muzikon.

Finfine, la 4-an de majo, la duan tagon de la kongreso, okazis Solena Malfermo per salutvortoj de Emilio Gastón Sanz, (unua popoldefendanto de Aragono komence de la hispana demokratio) kaj nepo de de la kunfondinto de "Frateco" kiu hispanlingve parolis pri la historio de la Movado en Zaragozo. Tuj poste intervenis la prezidanto de HEF Toño del Barrio. Post la solena kaj amuza malfermo de la kongreso, komencis la interesaj prelegoj pri poezio kun interveno unualoke de Miguel Fernández, kiu prelegis sub la titolo: "Poezio: armilo sarĝita per futuro. Esperanta antologio de hispana poezio kontestema, engaĝiginta, socia kaj revolucia". Kompreneble li ankaŭ aldonis kantojn kaj ricevis fortajn kaj tre indajn longdaŭrajn ovaciojn, kiujn li emociigite ricevis kaj dankegis.

Abel Montagut prezentis sian ludkarton de "Talismanoj" (3-an serion) pri "Mil kaj unu noktoj" kaj "Al-Ándalus". Li tre humure kreis la etoson per amuza maskovesto. Post la menciitaj intervenoj dum la mateno alvenis la horo por tagmanĝi, t.e. la bankedo, kie oni omaĝis denove al nia kara cent-jara samideano Eduardo Larrouy per bela donaco de HEF, kaj regalas nin per flamenkaj kantoj Miguel Fernández akompanata de spontana dancistino. Je la 17,30 h. posttagmeze okazis ateliero gvidata de Jorge Camacho "Esperanto kaj poezio", en kiu rolis la brila ideo "zombia agado", kaj li ankaŭ profitis la okazon prezenti lian novan verkon *En la profundo* kune kun la jam konataj poemaroj: *Celakantoj*, *Saturno*, *Eklipsas kaj filandroj* kaj *La silika hakilo*, starantaj surtable, inter aliaj.



Antonio Valén prelegis pri Kolocsay kaj liaj poemoj sub la titolo "Kalmo kaj malkalmo ĉe Kálmán Kalocsay". Kelkaj kongresanoj spontane intervenis legante poemojn de Kalocsay cititaj en la prelego Antonio, kiuj estis disdonitaj inter la ĉeestantoj, kaj faris la prelegon tre originala kaj ege amuza. Estas menciinda la deklamado de poemo farita de samideano Alexis Otero el Kubo, loĝanta en Svislando, kiu ne bezonis legi ĉar li konis parkere unu el la poemoj de Kolocsay.

Vere la plej grava kaj amuza evento estis la koncerto de JoMo ĉe la "Sala Creedende" de la urbo, kie multaj el ni dancadis kaj ĝuis la muzikon en diversaj lingvoj. Dum pli ol unu horo ni ĝuis la Bamban, la hispanan kanton Porrompomperon kaj pliajn, kiuj vigligis la etoson ĝis ekstazo.

Dimanĉe, la 5-an de majo, Antonio Marco Botella, denove prelegis, ĉifoje pri "Esperanto kaj poezi-difino". Kiel kutime li ofertis ekscelentan prelegon al la kongresanoj. Tuj poste okazis la Ordinara Ĝenerala Kunsido, al kiu estis inviritaj ĉiuj membroj kaj nemembroj de HEF. La temoj estis kiel kutime: Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (29. aprilo 2012), Aprobo de kontoj 2012, Aprobo de raporto pri aktivadoj 2012, Informo pri la anaro, Laborplano por 2013, Kotizoj por la jaro 2014, (kiuj ne altiĝas pro la krizo), Aprobo de la buĝeto por 2013 kaj la ĉefa temo estis "ILEI en Hispanujo?", kiu estis nur menciita kaj ne traktata ĝis la posta estrarkusido.

Iom post iom, la kongresejo malpleniĝis kaj Zaragozo fariĝis eksa hispana kongresurbo ĝis la venonta, kiu okazos en Arundo (Ronda), se ĉio bonordos. Mi esperas ke jes.

Ángel Arquillos

ESPERANTO-PLACO EN CHOISY-LE-ROI



La urbestro ĉeestis al la inaŭgura ceremonio de la nova Esperanto-placo la 15-an de decembro 2012 matene fronte al la stacidomo de la franca urbo Choisy-le-Roi. Ĉeestis 50 personoj.

Krom la urbestro Daniel DAVISSE ĉeestis la unua vic-urbestro Jean-Joël

Lemarchand kaj la prezidantino de Franca Fervojista Asocio Sylviane Lafargue.

S-ro Louis Zaleski-Zamenhof, la nepo de la kreinto de Esperanto, faris malferman paroladon antaŭ la inaŭguro. Sur tiu sama placo jam estis inaŭgurita busto de Zamenhof en 1987.

Posttagemeze okazis la tradicia Zamenhof-festo.

Raymonde Conquisart

El Esperanto, 2013, n-ro 3

AEPA 2013 EN BULGARIO

La 5-a Scienca Simpozio - AEPA-2013 okazos en Karlovo kaj Sopot (Bulgario) de la 29.06. ĝis la 03.07.2013. Honoraj protektantoj estos d-ro Emil Kabaivanov - Urbestro de komunumo Karlovo kaj Veselin Liĉev - Urbestro de komunumo Sopot. En la programo de la simpozio ni antaŭvidas ankaŭ apartajn fakkunvenojn pri interlingvistiko, eŭrologio, ekonomio, ekologio, esperantologio, informadiko, komerco, medicino, turismo, kulturo, juro, tekniko, ĵurnalistiko k. a. fakoj kies reprezentantoj partoprenos la simpozion. Oficiala lingvo denove estos Esperanto, sed laborlingvoj ankaŭ estos bulgara kaj la lingvoj de la scienculoj kaj fakuloj kiuj ne konas Esperanton.

Temoj de la prelegoj: diversaj sciencaj kaj fakaj prelegoj kunligitaj kun profesia agado de la prelegonto. La prelegonto povos prezenti koncize sian prelegon (ĝis 30min) kaj poste estos diskutoj pri la temo. La plenan tekston de la prelego ni publikigos post la simpozio en prelegaro. Ni petas la prelegontojn ĝis 22.06 sendi al ni resumojn de la prelegoj, ĉar ni dezirus disdoni ilin al la partoprenontoj en la komenco de la Simpozio. Post la Simpozio okazos la Seminario "La religio kaj homaro" (01.07-05.07.2013 – en Karlovo).

Simpozejo: Internacia Universitato Karlovo. La solena Inaŭguro estos en la urbodomo

Tranoktado: en studenta domo kaj hoteloj

Aliĝilon petu ĉe:

[E-mail:leonov@rozabg.com](mailto:leonov@rozabg.com) aŭ: Bulgario 4300 Karlovo p.k.44 Internacia Simpozio (sendu la leterojn preferinde rete).

Boĵidar Leonov

LA 17-a ESPERANTO-KONFERENCO DE ALP-ADRIO EN SLOVENIO

Alpadrio estas regiono kiu kovras najbarajn teritoriojn de Norda Italio, Slovenio, Suda Aŭstrio, Kroatio kaj okcidenta Hungario. Esperantistoj de tiu regiono okazigas pli-malpli regule siajn Esperanto-konferencojn. Ĉi-jare tiu konferenco okazos en Slovena ĉemara urbeto Izola inter la 1-a kaj 2-a de junio. Kunorganizas ĝin Slovenia Esperanto-Ligo kun helpo de Triesta Esperanto-Asocio.

Skribu al:

Francka RIZNAR: fani.riznar@gmail.com aŭ Edvige Ackermann: nored@tiscali.it

Aliĝilojn uzendajn/sendendajn rete petu ĉe: testudo.ts@gmail.com

INTERVJUO KUN ERICH-DIETER KRAUSE PRI INDONEZIA LINGVO

Intervjuo de itala revuo Disvastigo

Erich-Dieter KRAUSE (nask. 1935) Prof. Dr. phil. habil., estis en la jaro 2000 germana emerita profesoro pri la indonezia lingvo ĉe la Orientazia Instituto de la universitato de Leipzig en Germanio kaj vortaristo kaj leksikografo pri la indonezia kaj Esperanto. Li estas membro de la Akademio de Esperanto kaj de la redakta komitato de la faka periodaĵo "Esperantologio / Esperanto Studies / EES". (Fonto: Vikipedio)

MR: Niĝerio kaj Indonezio estas grandaj ŝtatoj (160 kaj 240 milionoj da loĝantoj) kaj ambaŭ enhavas grandan kulturen riĉecon. Niĝerio elektis la anglan - la lingvon de la koloniistoj - kiel oficialan. Kia estis la decido de Indonezio?

EDK: En Niĝerio la oficiala lingvo fakte estas la angla, tamen laŭ artikolo 53 de la nacia konstitucio el la jaro 1979 oni permesas, aldone, la uzon de la lingvoj haŭsa, igboa kaj joruba en la Nacia Asembleo. Sur la ebena de la federacia ŝtatoj, ene de la Leĝdona Asembleo, oni permesas la uzon de la angla aŭ de iu niĝeria lingvo, en la Borno State Assembly la anglan lingvon aŭ niĝerian lingvon, nome la haŭsan aŭ la kanurian.

En Indonezio, kontraŭe, oni decidis post la sendependiĝo (Indonezio estis dum jarcentoj nederlanda kolonio /Nederlanda Hindio/) enkonduki novan nacian lingvon, Bahasa Indonesia. En tiu vastega lando kun siaj pli ol 13.000 insuloj (el kiuj ĉirkaŭ 7.000 estas hom-loĝataj) inter la Pacifika kaj Hinda Oceano ĉiuj naciaj kaj administraciaj organoj uzas UNU lingvon, kiu estas konstruita el leksemoj el la ĉirkaŭ 250 regionaj lingvoj (ekzemple la java, minangkabaŭa, balia, bataka kaj multaj, multaj aliaj). La gramatiko estas bone strukturita kaj la afiksara sistemo faris pruntojn ankaŭ el ne-indoneziaj lingvoj, ekzemple el sanskrito kaj el eŭropaj lingvoj, aparte el la nederlanda kaj, novatempe, el la angla. Eĉ oni povas, kelkfoje, malkovri, ke ekzistas similaĵoj gramatikaj inter la indonezia lingvo kaj Esperanto. Detalumi pri tio nun postulus tro da spaco.

En la familiaj medioj, kompreneble, oni uzas en Indonezio la lokajn dialektojn kaj/aŭ

regionajn lingvojn. Sed, ekzemple, la eduka sistemo, la justico, la komunikadaj rimedoj (gazetaro, televido, radio) strikte uzas nur la Bahasa Indonesia.

MR: La lingvo "Bahasa Indonezia" povas esti komparata kun la suahilia?

EDK: Estas iom hazarde kompari la svahilan lingvon kun la indonezia. Mi ne dirus, ke estas multaj similaĵoj. Sole la kolektivplurala sistemo de ambaŭ lingvoj estas simila en kelkaj kazoj.

MR: Ĉu estas altnivelaj kursoj de tiu-ĉi lingvo en Eŭropo?

EDK: La studoj pri Indonezio en eŭropaj universitatoj, la tiel nomata indoneziistiko, ĉefe floras en Nederlando, kies centro estas la universitato de Leiden. Tamen ankaŭ en ceteraj landoj eŭropaj oni povas, altnivele, studi la indoneziajn lingvon, kulturon, historion kaj arton. En Germanio ekzemple en la universitatoj en Berlin, Hamburg, Kolonjo (Köln), Passau kaj aliaj estas ebleco studi indoneziistikon.

MR: Ĉu Indonezio povas esti modelo por Eŭrop-Unio?

EDK: Certe iagrade la modelo uzi UNUSOLAN lingvon kiel en la mult-etna lando Indonezio povus esti interesa ankaŭ por la Eŭropa Unio, sed estas treege dubinde, ke io tia realiĝos, ĉar tro grandaj estas la rivalecoj inter la naciaj lingvoj en Eŭropo. Esperanto ja estus bona solvo, sed por tiu revo mankas la lobiistoj ...

SOMERA PROGRAMO EN GRESILLON



Dum la turisma semajno de la 6a ĝis 13a de julio, profesia ĉiĉerono esperantista gvidos tuttagajn busekskursojn al la Luar-kasteloj kaj vidindaĵoj de la regiono Anĵuo. Esperanto-kurseto okazos poste. Restas ankoraŭ 1 semajno por profiti redukton de 10 % por tiu semajno. Detaloj en <http://gresillon.org/s1> - aliĝilo en <http://gresillon.org/alighos>

La kompleta somera programo de la 6a de julio ĝis la 17a de aŭgusto proponas art-amatoran semajnon, alternativan

MOJOSEJOn, festan semajnon por infanoj kaj familioj kaj teatran semajnon kun profesia aktoro esperantista.

Vidu la resumon de la somera programo en <http://gresillon.org/somero>

Redukto de 10 % validas por aliĝo almenaŭ 2 monatojn antaŭ la komenco de via restado Skribu al: Maison Culturelle de l'Espéranto, Château de Grésillon, Saint-Martin d'Arcé 49150 Baugé en Anjou, France

INVITO AL SENPERA INTERNACIA DIALOGO (INVITO AL EDE-LABORKUNVENO EN HUNGARIO)

Ne sufiĉas nur fantomi pere de la reto. Por esti kaj resti homo necesas senperaj kontaktoj. Ne sufiĉas nur vizaĝlibra diskuto. Venu kaj montru vian vizaĝon fizike kaj diskutu vive. Esperanto estas la ebleco por internacie vasta, demokratie senpera kontakto en la mondo. Sen traduka interrompo ĝi permesas spontanecon por ĉiu homo. Venu kaj trejnu vian internacian senperecon. Kie?

Pliaj informoj: <http://www.e-d-e.org/Invito-al-Politika-diskuto-en?lang=en>

Eŭgeno Macko

KATALUNA ESPERANTO-KONGRESO EN NOVEMBRO

La 36a Kataluna Kongreso de Esperanto estos ankaŭ la 1a Okcitana Kongreso de Esperanto. Kunorganizata de Kataluna Esperanto-Asocio (KEA) kaj la Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL), pluraj okcitanoj partoprenos, pro proksimo kaj pro intereso. Elstaras la partopreno de la lingvisto Jacme Taupiac kaj la verkisto kaj muzikisto Joan-Marc Leclercq (JoMo). Konfirmis ankaŭ sian partoprenon Uwe-Joachim Moritz, honora prezidanto de IKEL.

La kongreso okazos en urbeto Salardú, en Valo Aran, eta teritorio okcitanlingva ene de la hispana ŝtato, kaj ĝia ĉefa temo estos la okcitana lingvo kaj kulturo, Okcitanio kaj la perversaj metodoj mortigi lingvojn. Arano ankaŭ proponas kulturajn kaj naturajn ekskursojn, en tre bela loko.

Pliaj informoj kaj aliĝoj ĉe: <http://esperanto.cat/kongresoj/2013/index.php>

Ferriol Marcip i Bonet

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Finredaktita: la 31-an de majo 2013

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, António Martins-Tuválkin, Seán Ó Riain, Ángel Arquillos, Boĵidar Leonov, Raymonde Conquisart, Francka Riznar, Eŭgeno Macko, Ferriol Marcip i Bonet.

Kontakto: ztisljar@gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/euhropa-bulteno>

